

Nagata H (2001b). Japanese speakers' judgments of grammaticality of Japanese and English bitransitive sentences with a differing number of arguments: A comparison between speakers exposed to Chomsky's generative grammar and those not. *Okayama Economic Review*, 33, 25-34.

Nagata H (2003). Judgments of grammaticality of Japanese sentences violating the principle of Full Interpretation. *Journal of Psycholinguistic Research*, 32, 693-709.

Nagata H (2004). Faulty Japanese sentences are judged more grammatical when punctuation is used: Negative implications for Chomsky's principle of Full Interpretation. *Perceptual and Motor Skills*, 99, 325-336.

Nagata H (2006). Judgments of grammaticality of Japanese simple sentences involving two arguments in a whole-part relation: A further examination of Chomsky's principle of full Interpretation. *Perceptual and Motor Skills*, 102, 855-870.

Nagata H (2010). Chomsky's derivation-by-phase theory as applied to judgments of the grammaticality of Japanese double accusative sentences. *Language Sciences*, 32, 427-446.

Nagata H & Bain B (2000). Judgments of grammaticality of sentences with a differing number of arguments: A comparison of English and Japanese speakers. *Perceptual and Motor Skills*, 91, 503-511.

Naigles LG, Gleitman H & Gleitman LR (1993). Children acquire word meaning components from syntactic evidence. En E Dromi (Red), *Language and cognition: A developmental perspective* (pp. 104-140). Norwood, NJ: Ablex.

Pinker S (1989). *Learnability and cognition: The acquisition of argument structure*. Cambridge, MA: MIT Press.

Radford A (2004). *Minimalist syntax: Exploring the structure of English*. Cambridge: Cambridge University Press.

Tomasello M (1995). Language is not an instinct. *Cognitive Development*, 10, 131-156.

Tomasello M (2009). Universal grammar is dead. *Behavioral and Brain Sciences*, 32, 470-471.

Tsujimura N (1996). *An introduction to Japanese linguistics*. Oxford, UK: Blackwell.

Adreso de la aŭtoro

Prof. Hiroshi NAGATA
Department of Clinical Psychology
Kawasaki University of Medical Welfare
288 Matsushima,
Kurashiki 701-0193 / JAPANIO

<hinagata@mw.kawasaki-m.ac.jp>

Priaŭtoro informo

La aŭtoro estas profesoro pri psiĥologio kaj speciale studas psiĥolingvistikon rilate al lingvoscio kaj ties akirado fare de denaskaj parolantoj.

Dek aspektoj koncerne ekologian amendon de la UEA-statuto

Wolfgang GÜNTHER

1. Homo kaj vivo

- Ne kontestblas la fakto, ke la homo kiel vivanta pensa materio kaj kiel individuo aŭ ajnforma kolektivo estas parto kaj partnero de la tutvivo en la geobiosfero de nia planedo (1, 2).

- La kerna ideo pri tio esprimiĝas per la sentenco de *Albert Schweitzer*: “**Mi estas vivo, kiu volas vivi, meze de vivo, kiu volas vivi.**” (1)

- Ĉiu el ni havas (nur) 1 vivon sur (nur) 1 planedo.

2. Biologia diverseco

- La stato de la biologia diverseco (specioj, genresursoj, ekosistemoj) tutmonde kaj kontinue malboniĝas (3, 4). La sekretariejo de la “Konvencio pri Biologia Diverseco” (1992, *UNEP, WCMC*) konfesas en sia “3-a Tergloba Perspektivo pri Biodiverseco - 2010”, ke neniŭ de la en 2002 starigitaj celoj koncerne reduktion de la perdo-kvoto de biodiverseco estis atingata. (5)

- Aktuale la mondo perdas planto- kaj besto-speciojn 100-oble ĝis 1000-oble pli rapide ol respondas al la natura formortokvoto. (3, 9)

- Fono de ĉi tiu evoluo estas la **tutmonda konsumo-plezuro-disi-po-industrio** nome de la t.n. “globaligo” (6) surbaze de individualismo kaj proprieto kiel dominaj kredoj kaj de ekonomiaj kresko kaj profito kiel rega merkata logiko. (7)

- Detale la kialoj estas la klimatoŝanĝiĝo (CO₂-ktp.-pliiĝoj pro fabrikoj, turismo, kulturaj kaj politikaj aktivecoj ktp.), ŝanĝiĝoj de la vivospacoj (disdividoj de arbaroj, surkonstruado de grundoj, trafik-sistemoj ktp.), invadaj fremdspecioj, troekspluatado de naturaj resursoj (neniigo de praarbaroj, foruzo de akvorezervoj, trofiŝkaptado ktp.), poluado (toksoj, trosterkado ktp.). (4)

3. Kultura diverseco

- Kultura diverseco estas centra temo de UNESKO (vd. la “Universalan Deklaracion pri Kultura Diverseco”, 2001). Ĝi aperas ankaŭ sub la termino “**biokultura diverseco**”, havas apartan lignon al

“**lingva diverseco**” kaj speciale emfazas la sciojn kaj konojn de indiĝenaj popoloj. (8, 9, 10, 11)

- Ekzistas fortaj indikoj pri **paraleleco de biologia kaj kultura-lingva diversecoj**, ekz. en multaj tropikaj regionoj. Oni parolas pri “nemalimplikebla ligo” inter biologia kaj kultura diversecoj. “Bio-kultura diverseco do ampleksas la diversecon de vivo en ĉiuj siaj konkretiĝoj: biologia, kultura kaj lingva, kiuj estas interrilataj (kaj probable kunevoluis) ene de kompleksa soci-ekologie adaptiva sistemo. Lingvo estas komprenata kiel vehiklo por komunikadi kaj transdoni kulturajn valorojn, tradiciajn sciojn kaj praktikojn” (12). Hodiaŭ ni observas signifikan interkovron pri la lokoj de minacataj ekosistemoj kaj tiuj de minacataj lingvoj. (13)

- La graveco de biologia kaj kultura diversecoj kaj de la al la lasta ligataj lingva diverseco kaj **dialogemo** konsistas en la fakto, ke, ju pli da respektivaj resursoj troviĝas en la respektiva medio, des pli da fortoj povas efike preventi kaj kontraŭagadi koncernajn perturbojn kaj damaĝojn. (14)

- Ĉi-rilate oni atentu la nociojn de “**resilienco**” (= povo de ekosistemo toleri perturbojn sen kolapso) (15) kaj “**leĝo de necesa variececo**” (= ju pli alta estas la varieco de disponeblaj (re-)agoj en iu kontrolsistemo, des pli alta estas la varieco de perturboj, kiujn ĝi povas kompensi). (16)

4. Fari kaj lasi

- Tre principa problemaro estiĝas el la diversaj konceptoj pri fari kaj lasi, labori kaj paŭzi. Necesas kriterioj pri dezirata, permesata kaj nedezirata agadoj. La ĉefa kriterio devus esti la malakcelo de la entropio (t.e. ĉi tie: de la “dissolvo” de la mondo pro ties utiligado). Ĉi-kuntekste temas pri evidenta disipado, ekz. forme de la “**ĉion-ĉiam-ideologio**”. (En la mondomerkato cirkulas kvin- ĝis sesoble pli multe da varoj ol necesas por la kontentigo de bazaj bezonoj!)

- Kio pri “Formulo 1”? Aŭ: Ĉu oni flugtransportu ĉevalojn al la Emiratoj?

- Kulturo pro si mem ne permesas poluadon!

5. La limig-it(-at)eco de la Planedo

- Jen vero malkomforta, maloportuna, malagrabra, malkonvena: nia planedo estas limigita! Diris la Usona politikisto-medioprotektisto *Stewart Udall*: “**Mankas al ni aprezo pri la signifo de la limoj kaj konscio pri la graveco de la resursoj de nia planedo.**”

- Pli kaj pli evidentiĝas la limig-i(-a)teco de nia Tero: de pli ol 30 jaroj ĉi tiu nia mondo konsumas 30 % pli da resursoj ol la naturo povas regeneri kaj trotoksas la biosferon je 40 %.

- La **ekologia piedsigno** estas la Surtera areo, kiu necesas por ebliigi la vivostilon kaj vivonivelon de unuopa homo sub la hodiauaj produktadokondiĉoj. La Tero disponas pri **1,8 ha po persono**, ĉi tiu valoro aktuale estas ekscesigata je 23 % (averaĝe 2,2 ha, Usono 9,7 ha, la EU 4,7 ha, Barato 0,7 ha (!)). La troŝarĝo ante la biosferon ige de la EU sumiĝas laŭ tio je pli ol 100 %!

- Ankaŭ la biokultura diverseco submetiĝas al la limoj de ĉi tiu planedo. La reduktiĝo de diverseco signifas reduktiĝon de la “**evolucia potencialo de la vivo**” kaj de la “disponeblaj opcioj por la futuro de la homaro kaj la planedo” (12). Ĉi-rilate “ĉiu redukto de la lingva diverseco malaltigas la **adaptopovon de la homa specio**, ĉar ĝi reduktas la provizon de scioj el kiu ni povas ĉerpi.” (17)

6. Justeco

- Ankoraŭ validas, ke ĉirkaŭ 20 % de la mondloĝantaro disponas pri ĉirkaŭ 80 % de la mondresursoj kaj la el tiuj produktitaj varoj.

- La evoluiga problemo de la tutmondiĝanta homa komunumo estas la antagonismo inter la **justeco- kaj la medio-krizo**. Ĝi fariĝis la rekonilo de nia epoko. Kaj ĉe tio en la justecokrizo kontinue kaŝiĝas la antagonismaj fortoj inter libereco kaj egaleco. La dilemo konsistas en la postulo, ke, solvante la justecokrizon, oni ne (pli-)malbonigu la mediokrizon. Ni bezonas ambaŭ: universale akcepteblan soci(al)an justecon kaj universale integran biosferon. La progresigo de la malriĉuloj al la ekonomia kaj ekologia niveloj de la klaso de la konsumantoj necesigus minimume 2 ĝis 3 pliajn planeojn Tero. La logika sekvo estas, ke por inda estonto la vivonivelo de la pliriĉuloj devas esti decide limigata, eĉ grave reduktata. (18)

- Jen per vortoj de *Wolfgang Sachs* (scienculo de la “*Wuppertal-Instituto pri Klimato, Medio, Energio*”): “Temas pri tio: unuflanke fari la aferojn juste kaj aliflanke fari la ĝustajn aferojn... Je transiro al ekologia socio ne temas nur pri naturo kaj vivokvalito, sed pri justeco inter la popoloj kaj homoj. Eĉ pli, mond-civitana socio imageblas nur sur la fundamento de ekologia transformado de la superregaj produktad- kaj konsum-modeloj. Ĉar lastinstance la granda demando, al kiu la komenciĝinta jarcento devas trovi respondon, ja tekstas, kiel doni gastemon en mondo de duoblo da homoj sen ru-

inigi la biosferon por la venontaj generacioj. Se la demando iam ajn trovos respondon, tiu devas esti ekologia. Kiel oni leĝere povas vivi sur ĉi tiu Tero – pri tio parolas la **ekologio**. Ĝi, alivorte, apartenas al la ingrediencoj de kosmo-politikeco en la **postnacia epoko**." (19)

- Gravan kontribuon al la ideo de ekojusteco faris la "Ekumena Konsilantaro de la Eklezioj (EKE) – (angle *World Council of Churches* - WCC) en sia "Deklaracio pri Ekojusteco kaj Ekologia Kulpo", 2009. En ĝi estis ankaŭ starigata la postulo pri "**mekanismoj cele al kompensado de dum niaj kunvenoj estiĝinta ekologia ŝuldo**." (plena traduko en (20))

7. Paco, Homaj Rajtoj kaj daŭropov(ec)o

- Paco, Homaj Rajtoj kaj daŭropoveco estas la gvidaj parametroj por vivinda futuro. En ĉi tiu koncepto la daŭropoveco baziĝas sur kvar piedoj: **la soci(al)o, la ekonomio, la ekologio kaj la kulturo**. Certas, ke la "klasika" kapitalismo finiĝantas: la ekonomio, kiun la mondo bezonas, estas iu science fundamentita doktrino de universale medi-socie adaptita agado pri rigore kvalita kreskado, juste distribuataj profitoj kaj draste reduktita disipado. (21)

- En la principo 25-a de la "Deklaracio de Rio-de-Ĵanejro" (Konferenco de UN pri medio kaj evoluigo, 1992) tekstas: "**La paco, la evoluigo kaj la protektado de la medio estas interdependaj kaj nedivideblaj**."

8. Kulturoj de daŭropoveco

- La mondo survojas al tuttergloba ŝanĝiĝo de la pensostato kaj pensmaniero (angle "*global mindset*"). La **serĉoprocezo** pri kulturoj de daŭropoveco koncernas la homon en ĉiuj sferoj de sia ekzisto: en la memidenteco kiel pensa viva materio, en sia kreiva idento kaj potencialo, ĉu en teorio ĉu en praktiko. Biologia kaj kultura-lingva diversecoj estas grava antaŭkondiĉo-fundamento de ĉi tiu procezo (vd. supre sub 2. kaj 3.), kiu amplekse uzas transdisciplinan alpaŝon (t.e. kombinon de sciencoj kaj la ĉiutaga vivo).

- Ĉefaj kapvortoj-rilatpunktoj ĉi-koncerne estas: **1. resilienco** (vd. supre sub 3.), **2. inter..., trans..., 3. sistempensado, transdisciplineco, 4. aŭtoekopoietiko** (= memorganizado de sistemoj laŭ ekologiaj determinantoj), **5. kunevolucio, 6. etiko kaj estetiko de daŭropoveco** (sistemsensiveco – la modeloj, kiuj konektas: **temoj, procezoj, valoroj, 7. sustensio**. (18, 22, 23, 24, 25)

9. Preventivo

- Preventivo estas plej decida kaj ofte plej simpla trajto en la praktik(ad)o de daŭropoveco. Al ĉi tiu baza koncepto apartenas ĉefe la principo de "**En kazo de dubo: NE!**" En la "*Global Biodiversity Outlook 3*" de UNESKO, 2010, tekstas eksplicite (5, p.10): "**Scienco necerteco** pri la precizaj rilatoj inter biologia diverseco kaj homa bonfarto kaj la funkci-maniero de ekosistemoj ne estu senkulpigoj por neaktiveco. Neniu povas antaŭdiri, kiom proksimaj ni jam estas tie, kie ekosistemoj renversiĝas, aŭ kiu aldonita ŝarĝo ĝin renversas..."

- Preventivo konkretiĝas kvalite kaj kvante, laŭkvalite kiel reduktado de riskoj-minacoj kaj laŭkvante kiel reduktado de konsumoj-disipoj. Ja validas la principo ne forpreni pli da resursoj el la geobiosfero ol povas esti regenerata kaj ne pli toksigi la medion ol povas esti bufrata. Fakte ne temas pri alia ol tio, kion la **indianoj jam dum jarcentoj** advokatis kiel saĝecon.

10. Ekologia amendo de la UEA-statuto – ekzemplo de la kulturoj de daŭropoveco

- En la 3-angulo inter limigiteco (de la Planedo), justeco (intra- kaj inter-generacia) kaj daŭropoveco (pro biokultura diverseco) **Esperanto** rolas tra la paradigmo de daŭropoveca evoluigo, kiel la lingva parto de ekologie konforma internacia komunikado. En la kulturoj de daŭropoveco neŭtrale internacia lingvo kiel Esperanto montriĝas kiel ekzemplo de rigoro (scienco), malfermiteco (dialog(em)o) kaj toleremo (soci(al)o), ĝuste kiel formulita en artikolo 14 de la "Ĉarto pri Transdisciplineco". (23)

- Male al ĉiuj etnaj lingvoj Esperanto estas soci-ekologie daŭropoveca rimedo de (inter) komunikado ĝuste pro tio, ke ĝi **pro si mem estas preventiva**. Nur tre malmultaj homaj eltrovaĵoj povas aserti tion pri si. Ĉi tiu imanenta soci-ekologia daŭropoveco prezentiĝas en du formoj, nome kiel "**demokratia 2-lingveco**" kaj kiel "**biosfera adekvateco**". En detaloj tio signifas:

1-e. Laŭ **kvalita** kriterio kaj rilate la mondvastan justecokrizon la utiligo de Esperanto kiel "**1 lingvo por ĉiuj**" sur interkultura, interetna kaj internacia niveloj estas **socie daŭropoveca** interkomunikado, ĉar ĝi **dekomence reduktas porsociajn riskojn** pro tio, ke ĝi forigas la avantaĝigon de ajna etna lingvo, efektivigante univer-

salan justecon rimede de la preventive justiga principo de "**demokratia 2-lingveco**". (Estas intertempe bone konate, ke **egaleco** ne nur tuŝas "idee" demokratian 2-lingvecon kiel tian, sed ankaŭ **konkretajn financajn avantaĝojn** de tiuj nacioj, kies lingvoj estas reale plej uzataj internacie kaj kiujn tiuj, kiuj ilin denaske ne sciopovas, konstante je propraj kostoj kaj tempo devas lerni (en 18). La penado de la unuopulo pri ĥronika lernado de fremda lingvo similas al la virtula akvo, kiun "kunportas" varo – oni ĝin ne vidas, tamen ĝi ekzistas kaj plejofte ŝarĝas nenecese.)

2-e. Laŭ **kvanta** kriterio kaj rilate la mondvastan mediokrizon la utiligo de Esperanto sur regiona kaj superregiona niveloj estas **ekologie daŭropoveca**, ĉar ĝi **dekomence reduktas pormediajn riskojn** pro tio, ke ĝi forigas la malavantaĝojn por la biosfero, efektive igante universalan medioprotektadon rimede de la preventive ekologiiga principo de "**evitado de priresursa disipado kaj albiosfera toksado**". (Esperanto reduktas la nombron de la tradukvoj de "n·(n-1) al "n", se "n" estas la nombro de la lingvoj, en la EU nuntempe de 506 al 23. Aldone la impostŝarĝo de la averaĝa civitano de la EU por lerni Esperanton reduktigas al malpli ol 5 % de tiu necesa por lerni 3 fremdlingvojn, kiel kelkfoje estas postulata de la EU. (en 18))

- Kompreneble Esperanto forme de siaj individuoj kaj kolektivoj efikas negative sur la medion. Ĉi-cele pripensendas ekz. "**la ideologio de esperantisma mondprivojaĝado**". Por mildigi-nuligi la neeviteblajn kontraŭekologiajn efikojn pro la agado de la "oficiala esperantismo" oni bone povus establi kompensmeĥanismojn, ekz. partoprenadon en reforestigaj projektoj, simile al la fondusoj de usonaj verkistoj aŭ la ekstrapagoj de mediokonsciaj flugpasaĝeroj.

- Al la koncepto de demokratia 2-lingveco apartenas enkonduko-utiligo de Esperanto kiel **oficiala, sed libervola** ebleco por tiuj, kiuj tion volas. La demando, ĉu Esperanto savus la kulturan diversecon, ĉi-okaze estas superflua. (kp. 26)

- Ĉi tiuj tempoj ne estas tiuj de Zamenhofo. Samkiel la paco kaj la Homaj rajtoj, ankaŭ daŭropoveco estas **modelo, kiu konektas** (kp. 25): ĝi efektive estas la **natura kaj necesa plivastigo de la "inter-na ideo"**. La amendo de la UEA-statuto per la koncepto-identeco de "daŭropoveco" estas natura, necesa kaj racia pliampleksigo de la laborbazo de UEA.

- La implikoj de ĉi-tipa ekologia amendo de la UEA-statuto respondas al jenaj ŝlosilaj mesaĝoj de la raporto pri la ligoj inter biologia kaj kultur-lingvaj diversecoj (8, p. 33):

* Diverseco estas grava antaŭkondiĉo por sekurigi evoluigon, kiu estas medie, soci(al)e, kulture kaj ekonomie resiliencia kaj daŭropova.

* Apartigite evoluantaj biologiaj kaj kulturaj diverseco-agendoj estu sisteme ligataj.

* La mediaj, soci(al)aj kaj ekonomiaj profitoj de diverseco estu integrigataj en la desegno kaj efektivegado de konservado kaj de daŭropovaj evoluigaj modeloj, projektoj, strategioj kaj aktivecoj.

* **Integrigo de la valoroj de diverseco en la projektado** devas okazi sur internaciaj, naciaj, regionaj kaj surlokaj niveloj.

* Plifortigi jam ekzistantajn kaj krei novajn formojn por sciencistoj, komunumano kaj aliaj sciuloj estu promociita por subteni la projektoplanadon.

- Kune kun UNESKO, la UN, la UN-Medio-Programo (angle *UNEP*), la "Konvencio de la UN pri Biologia Diverseco" (angle *CBD*) kaj la Monda Konservada Unio (angle *UCN*), Universala Esperanto-Asocio (UEA) "povus inkludi en siaj prioritatoj kaj agadoplanoj la plibonigitan komprenon pri la ligoj kaj sinergioj inter biologia kaj kultur-lingv(istik)a diversecoj, samkiel pri la rolo de kultura kaj tradicia sciigo kaj surlokaj lingvoj en konservado de biodiverseco" (12). "**La koncepto pri konservado memorigas nin pri niaj devoj al la naturo kaj la estonteco, sen kiuj la rapido de ekonomia kresko estos sole mezuro pri la rapideco, per kiu ni alproksimiĝas la abismon.**" (22)

- Certe la ampleksigo de la laborfundamento de UEA bezonas **amendon** de la UEA-statuto, ĉar 1-e la koncepto daŭropoveco egalvaloras al tiuj de paco kaj de Homaj rajtoj kaj 2-e, enstatutigita formo estas **jurisdikciebla** kaj per tio ne donas tiom da kialoj por "necesita" kverelado.

Literaturo

1. A. Schweitzer, Die Ehrfurcht vor dem Leben, Beck, 2008
2. Global Ethic Foundation, Declaration Toward a Global Ethic, 1993, III. 1.
3. <http://www.kultur-kreative.de/2010/01/internationales-jahr-der-biologischen-vielfalt/>

4. <http://greenfacts.org/de/biodiversitat/2005>
5. *Global Biodiversity Outlook 3*, 2010 (UNESCO)
6. www.tu-cottbus.de/interkulturalitaet/lecture_material/.../globalisierung.pdf
7. <http://sustensions.gravitations.org/>
8. *Links between biological and cultural diversity* (UNESCO, The Christensen Fund), 2007
9. http://centerforabetterlife.com/deu/magazine/article_detail/asso?id...
10. www.nas.boku.ac.at/...PDF_arche_noah_magazin_2_07_vogl_lukasser.pdf
11. *Seyla Benhabib*, Kulturelle Vielfalt und demokratische Gleichheit, Fischer, 1999
12. *Luisa Matti*, Biocultural Diversity and Sustainability, in: *Handbook of Environment and Society*, 2007, www.terralingua.org/publications/Maffi/18-Pretty_Ch18.pdf
13. *Skutnabb-Kangay, T., Maffi, L., Harmon, D.* (2003), *Sharing a World of Difference: The Earth's Linguistic, Cultural and Biological Diversity, and Map: People, Languages, and Ecosystems*, Paris: UNESCO
14. *W. Guenther*, Kion do signifas kultura diverseco, Publika letero, 2010-09-01
15. de.wikipedia.org/wiki/Resilienz_ecology
16. *The Law of Requisite Variety*, <http://pespmcl.vub.ac.be/reqvar.html>
17. *Mühlhäusler, P.* (1995), The interdependence of linguistic and biological diversity, in: *Myers, D.* (ed.): *The politics of multiculturalism in the Asia Pacific*, Darwin: Northern Territory University Press, pp. 154
18. *W. Guenther*, Ekologiaj, ekonomiaj kaj sociaj argumentoj por neŭtrala internacia lingvo, *Scienca Revuo 3/2010*
19. *W. Sachs*, Sen ekologio neniu transnacia justeco, *POLIS*, 1, 2004
20. NULA HORO, Kiosko de Levanto 4, 2009, p. 35 (ĉe la aŭtoro)
21. *II. Internationales Manifest*, Die ökosozialistische Erklärung von Belem, Monda Socialforumo 2009
22. *Sacha Kagan*, Cultures of sustainability and the aesthetics of the pattern that connects, 2010, www.leuphana.de/institute/IKKK/.../Sacha_Kagan_ma.html
23. p2foundation.net/Charter_for_Transdisciplinarity-
24. <http://mezomian.typepad.com/>
25. *G. Bateson*, *Mind and Nature – A Necessary Unity*, Hampton Press, ISBN 1572734345
26. *G. Mickle*, Can Esperanto Save Cultural Diversity, http://home.arcor.de/gmickle/skk/92kuldiv_en.html
27. *I. Sacks* (2002), *The Dignity of Difference: How to avoid the Clash of Civilizations?*, London and New York: Continuum.

Adreso de la aŭtoro

Dr. Wolfgang GUENTHER

Ap 270

ES-03170 – *Rojales* (Alicante)

HISPANUJO

<w.guenther.esperanto@web.de>

Priaŭtoro informo

Anestezisto, ekologo (kulturoj de daŭropovo, transdisciplineco). Publikas ĉiujare la almanakon "Kiosko de Levanto - libera, skeptika, transkultura", neprofito multlingva projekto kun Esperanto kiel komuna lingvo.

Migrado en la malcertecon – Ĉu Serengetio mortos pro politikistoj? –

Rüdiger SACHS

Enkonduko

Malproksimtrafika stratoprojekto tra la norda parto de Serengetio, pri kiu oni aŭdis en septembro kaj oktobro 2010 en kelkaj televid-elsendaĵoj kaj detale legis en germanaj gazetoj, ŝokis la publikon. Tiuspeca strato distranĉos ne nur la Nacian Parkon, sed distranĉe mortigos la tutan Serengetian ekologian sistemon.

La Arusha-Manifesto

“La postvivado de niaj sovaĝbestoj estas grava deziro de ni ĉiuj en Afriko. Tiuj libere vivantaj kreaĵoj en sia netuŝita medio ne nur estas fonto de mirego kaj admiro, sed ankaŭ nemalhavebla parto de niaj naturtrezoroj kaj de nia estonta vivokvalito“ legiĝas en la *Arusha-Manifesto* de Tanzanio, tiam enkondukita de la ŝtatfondinto d-ro *Julius Nyerere* en Septembro 1961. “Ni akceptas tian respondecon kaj deklaras nin pretaj, ĉion fari kio estas en nia potenco, ke ankaŭ la pranepoj de niaj infanoj estos en la stato sin ĝojigi kaj ĝui tiun ĉi unikan kaj valoran heredaĵon“.

Temas pri la sovaĝbestoj en la naciaj parkoj en Tanzanio, speciale en Serengetio, kiu en la jaro 1921 fariĝis la unua naturprotektejo en la lando, kiu en 1937 estis deklarita “regiono de ĉasmalpermeso“, kiu fariĝis en 1951 Nacia Parko kaj kiu estis en 1956 la loko de la gravaj biologi-ekologiaj studoj de *Bernhard Grzimek** kaj lia filo *Michael*. En 1959 okazis plilarĝigo al la nordo kun apartigo de la *Ngorongoro*-kraterregiono kiel memstara rezervejo, kaj en 1981 Serengetio fariĝis Monda Heredaĵa Regiono (*World Heritage Site*).

Temas pri unu el la plej grandaj mondovaste ankoraŭ ekzistantaj sovaĝbestaj migradoj de 1,2 milionoj da gnuoj kaj 350 000 zebroj, kiuj difinas tiun Serengetian ekosistemon – kun sovaĝherbovora

* La laboron de prof. *Grzimek* ni omaĝis okaze de lia centa naskiĝdatreveno per artikoloj en SR 4/2009, kun multaj pluaj informoj pri Serengetio.